


ATENTU

La "cadoles" pli kaj pli malfortiĝas, minace de la vetero kaj bedaŭrinde de kelkaj turistoj
Respektu ilin ; malpermesu, ke viaj infanoj uzu loĝion kiel grimpeblan kaĝon ; ne kredu, ke utilas "malvesti" ilin de musko kaj vegetalaro, kiu male fortigas ĝian murbazon.
Respektu ankaŭ la vojojn, kiuj kondukas al ili, la bienojn rande de tiuj vojoj, la vinberojn kaj la vinbermaterialojn, la flaŭron, kiu tie spontane kreskas.
Dankon al vi gepromenantoj, kiuj respondecas pri via promonado.



La grupo "ESPERANTO 10" tradukis tiun faldfolion danke al la afabla permeso de
S-roj Jean Pierre DUBREUIL kaj Jean DAUNAY

La çampanjaj "cadoles" (prononcu kadol')

En la vilaĝo COURTERON



La granda komunuma "cadole" "antaŭ Champraux"
(pr. Ŝampro)

FORIREJO :



Esploru al 12 "cadoles"



Sage indikita irvojo laŭ 8 Km.

Por çiuj klarigoj (franclingve) sin turni al :
2 Rue des œillets – 10250 COURTERON
Tél: 03.25.38.20.94.

Kio estas "cadole" ?

Ĝi estas ŝirmejo el surmetitaj ŝtonoj sen ligilo kaj trabaro, ankaŭ nomita :logio .

Maloftaj estas tiaj tipaj konstruaĵoj en nia departemento sed oni abunde trovas ilin en sudaj regionoj . Oni cetere konas la "bories" (pr. : bori) sude de Francio .

La "cadoles" de la vilaĝo Courteron estas prakabanoj, antaŭe lokitaj en vinberoj, konstruitaj de vinberistoj mem el materialoj surloke trovitaj . La ŝtonoj eltiritaj el grundo estis apartigitaj : La plej ordinara konsistigis la "muros" (pr. : muro), tiujn malaltajn murojn kiuj limigis ĉiun parcelon ; la plej belaj, plataj kaj larĝaj, taŭgis por la konstruado de la "cadole" .

Tiuj vinberistaj kabanoj estas preskaŭ ĉiuj rondformaj, konsistantaj ĉefe el vertikala muro ofte plifortigita ekstere per aldono de senformaj materialoj . Ilia volbo estas nur korbelo el belaj klinaj ŝtonoj, kiuj iom post iom atingas la centron je pli-malpli granda alteco, lasante mezan aperturon, uzitan kiel kamenon .

Ligna trabaro ne necesas por tiu volbo el ŝtonoj en delikata amasigo, en bona ekvilibro kaj iomete klinaj, ke pluvo ne penetru internen .

La enirejo estas ĉiam malalta kun ŝtono iom pli granda ol la aliaj kiel lintelo .

Atestoj pri popola kaj anonima arkitekturo, memoraĵoj pri la pravinberistoj, al kiuj ili servis kiel rifuĝejo kontraŭ vento, pluvo, malvarmo, varmaga suno, por tie manĝi kaj ripozi, ili plurestis ĝis nun - necesas konfesi – danke al ... filoksero ! Oni fakte retrovas ilin preskaŭ nedifektitaj en abiaj nekulturejoj, kiuj iom post iom invadis la parcelojn detruitajn de la noca insekto kaj forlasitajn de la ruinigitaj vinberistoj .

Ili eltenis la tempopason malgraŭ plantokresko, kiu kelkfoje minacis ilin . Nun oni bone konas ilin kaj oni provas protekti ĉiujn, ĉar ili estas atestaĵoj pri la laboro kaj la peno de niaj geavoj . Ĉiuj estas diversformaj tial, ke ili estis starigitaj de homoj, kiuj neniel estis masonistoj kaj konstruis ilin laŭ sia maniero el la ŝtonoj de sia propra grundo surloke trovitaj .

Ĉiuj malsamaj sed ĉiuj similaj ! Similaj pro la maniero laŭ kiu ili estis konstruataj : sen gluilo kaj trabaro, kun malalta enirejo orienten direktita . Malsamaj : unu el ili estas tiel alta, ke oni alnomis ĝin "Pain de Sucre" (Konuso da Sukero) . Antaŭ ol eniri tiun alian "La Merveille" (la Mirindaĵo) oni trairas beletan kaj agrablan korteton .

Neniu el ili lasas nin indiferentaj . Tiu ĉi "Les Oeillet" (La Diantoj) aspektas iom kruda kiel tiu "du Luc" (de Luko) . Inverse tiu "la Grosse Rave" (la Dika Rapo) ŝajnas burĝa . Respektinda estas la enirkoridoro de la "Champraux Devant" (antaŭ Ŝampro) kaj tuta aro da piedirantoj ŝatas la komforton de la "Grande Loge Communale" (La Granda Komunuma Loĝio) .

Ĉi tie en Courteron, ĉampanprodukta komunumo, ni invitas vin trovi kun ni la spiriton de niaj antaŭaj vinberistoj laŭ vojo irebla duonveturile duonpiede (Sed kiu bonfartige estas tute trairebla piede) .

Ni opinias, ke tia esplorpromenado plezurigos vin kaj vi certe konsilos ĝin al viaj geamikoj .

Jean Daunay



La Mirindaĵo

ATESTAĴOJ

Laboraj atestaĵoj de niaj prauloj kaj jarcenta kultura heredaĵo, la vinberistaj "cadoles" prestiĝaj ambasadoroj de la Ĉampanja departemento "Aube", ankoraŭ defias tempon kaj homojn, fiere starantaj en vinberoj aŭ arbaroj



La "Cadole" de Luko



La Granda "cadole" en la Valo "Fremelaire"

Niaj vitokulturaj regionoj en Ĉampanjo estis ruinigitaj ĉirkaŭ la jaroj 1890 pro la filoksera epidemio, kiu detruis tiujn vitejojn ; anstataŭe kreskis la arbaroj enkaŝante la "cadoles" kaj iliajn sekretojn .



La Konuso da Sukero